*Saluton en la mondo de Bobelarto! Dankon ke vi estas ĉi tie, en la plej mojosa angulo de literaturamantoj!* 📖

## Omaĝo al la plej fekunda verkisto en la mondo!

**Kara Bobelartano!**

La titolo de tiu ĉi mesaĝo ne estas troigo. **István Nemere**, hungara verkisto kiu forpasis pasintjare en novembro estis la plej fekunda verkisto en la tuta mondo. Je lia morto la 800a libro estis eldonita.


Kompreneble kio gravas por ni estas la fakto, ke li ankaŭ verkis en Esperanto. 23 originalaj prozoj aperis dum la jaroj. En la butiko de **E@I** aĉeteblas kvin prozoj je favora prezo. https://mendu.ikso.net/

Ĉi sabate dum la legosalono ni malkovros la romanon *Vismar*. Ni legos la unuan ĉapitron de la verko. Ĝi estis eldonita de la eldonejo **Impeto**. Kun grandaj dankoj al **Anna Striganova** ni povos malkovri tiun ĉi romanon en la legosalono post morgaŭ.

*Libera Folio* rememoras pri Nemere: https://www.liberafolio.org/2024/11/15/istvan-nemere-en-vivdangero/.

Du artikoloj aperis en *La Ondo de Esperanto* pri li: https://sezonoj.ru/2024/11/nemere-2/ Krom la rememoro ankaŭ originala intervjuo el 2020: https://sezonoj.ru/2020/01/nemere/.

**Vismar - parto (PDF)** 🎁




István Nemere sidante ĉe tablo dum librofestivalo en Budapeŝto. Fonto de la foto ĉi tie.

La legosalonoj okazos **du foje** ĉiu sabate: je **8:00 UTC** kaj **14:00 UTC**.

Kioma horo estas tio ĉe vi? Kontrolu ĉi tie aŭ ekhavu la kalendaron de Bobelarto!

**Ekhavu la kalendaron de Bobelarto por vidi la komenctempojn ĉe vi!**



Jam aperis tiu ĉi citaĵo en la novaĵletero, sed indas citi lin denove. Kiel la penso kaj animo de la ĝisoste verkisto funkciis.

Serĉu la planitajn legosalonojn ankaŭ en Eventa Servo: https://eventaservo.org/serchilo?query=legosalono.

**Kaj ne forgesu, ke VI ĉiam povas oferti legosalonon!** Diru al ni viajn ideojn: kiun ni invitu, ĉu vi mem deziras montri viajn novelojn, poemojn antaŭ la publiko de Bobelaro?

Mi havas ideon pri kiun inviti al legosalono!

**Kiun el la du sesioj partoprenos vi?**

📖 **8:00 UTC:** https://eventaservo.org/e/bobelarto-legosalono-9.
📖 **14:00 UTC:** https://eventaservo.org/e/bobelarto-legosalono-10.

**Ni atendas vin en la Zoom-ĉambro de Bobelarto!**

Jen la ligilo al la Zoom-ĉambro: https://us05web.zoom.us/j/9481979052?pwd=MXdNdjE4WDQ0ZFBNNzc4VjF2S0s5Zz09

**Klaku por eniri la ZOOM-ĉambron de Bobelarto!**

Bonvenon al la unua legosalono de 2025! Ni esperas, ke vi merĝos vin en la mondon de Nemere kun ni!

**Se vi ne partoprenos ĉi foje la legosalonon tiam legu la PDF-on en via libertempo! Verkistojn ni povas plej bone rememori post la morto per legado de la publikigitaj verkoj.**

**Se vi persone konis lin aŭ havis interagon kun li, spertis aliajn verkojn de li tiam via rakonto kaj rememoro tre bonvenas en la legosalono!**

Fartu bone kaj esperebe ĝis sabato!
Stela 📖

P.S.: Ni dankas, ke vi plusendas la retleteron al interesiĝantoj!

P.S.2.: Aliĝu al nia telegramo-grupo por trovi mojosajn bobelartanojn en la reto: https://t.me/+0qXzAqX-NFMwNDI0

La retejo de Bobelarto troviĝas ĉi tie!

Jen la tri ĝisnunaj eldonoj de la Interkultura Novelo-Konkurso. La ciferecaj versioj estas donacoj al la komunumo de Bobelarto.

La **tria, ĉi jara** eldono nomiĝa**s:** ***La sekreta vivo de miaj najbaroj***.
🎁 Jen la PDF kaj la EPUB versioj de la novelaro.

La **dua** eldono nomiĝas: ***La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj***.
🎁 Jen la reviziitaj PDF kaj la EPUB versioj de la novelaro.

La **unua, inaŭgura** eldono nomiĝas: ***Amo, tuso kaj forpaso***.
🎁 Jen la reviziitaj PDF kaj la EPUB versioj de la novelaro.

**Agrablan legadon al vi!** 📖